



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

CGC Nº
00406 504/1000-06

JUNHO DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 46

Redação: MARIA ALMADA

BKE KONGRESOS

La direktoraro de Brazila Konsilantaro de Esperanto decidis okazigi sian unuan kongreson de Esperanto en la pitoreska urbo Juiz de Fora (MG) dum la Sankta Semajno de la venonta jaro.

La ĵus elektita estraro de la aktivuloj de la Kultura Esperanto-Asocio de Juiz de Fora, en la kadro de ĝia 70-jara jubileo entuziasme akceptis gastigi la eventon.

La malnova Esperanto-Klubo estingiĝis, la olda statuto estis renovigita kaj komenciĝis nova erao por la movado en tiu urbo kaj cirkaŭaĵoj.

La prezidanto de la organizaĵo, nun elektita, prof-ro Orlando José Lopes Junior estas dinamika kaj progresema persono. Kune kun grupo de kompetentaj gesamideanoj li enkondukas novan animon en tiun regionon.

Dum tiuj 70 jaroj de ekzisto de la malaperinta klubo neniam okazis tie Esperanto-kongreso, kvankam Juiz de Fora estas unu el la plej bonaj grundoj por la Esperanto-Movado.

Prof-ro José Passini sukcesis enkonduki Esperanton en la tian Universitaton kaj organizis la unuan kurson.

Nun nia anaro devas kongresi tie, kaj montri al la rektoro kaj precipe al la studentaro, ke Esperanto estas fakto.

Prof-ro Passini, la pasintan 8-an de junio faris prelegon pri Esperanto en la Komerca Lernejo de la najbara urbo Lima

Duarte (MG), kie gvidas kurson la prof-rino Zilda Vilela.

Same, en la urbo Santos Dumont, kie la movado estas iom malforta, pro nia kongreso vigliĝos la laboro pri Esperanto, ĉar la intereso estas granda.

Brazila Konsilantaro kalkulas je apogo de ĉiuj gesamideanoj kaj kunvokas ĉiujn vicprezidantojn partopreni nian kongreson. Estas necese propagandi kaj organizi karavanojn ĉar tiu kongreso celas esti la heroldo de nia Universala Kongreso okazonta en 1981.

Grava tasko estas amase partopreni ĝin, ĉar tiel ni elmontros kaj konvinkos la neesperantistojn pri nia movado kaj kapablo, laŭ la idealo de nia Majstro Zamenhof.

Gesamideanoj! Helpu la movadon! Ni atendos vin en Juiz de Fora kun malfermitaj brakoj, kun kora varmo kaj amike! Kê ĝi estu vere nacia kongreso!

LA 66-A UNIVERSALA KONGRESO EN BRAZILIO

La jaro 1981-a estos unu el la plej gravaj en Latin-AMERIKO kaj ankaŭ en la historio de Esperanto.

Neniam ĝis nun okazis UK en la suda hemisferio. Estas la unuan fojon, ke Brazilo gastigos tiel gravan eventon pri Esperanto.

Ni ĉiuj el grandaj kaj malgrandaj urboj, klopodu organizi kursojn, rekruti

novajn esperantistojn, informu pri la kongreso la neesperantistaron kaj organizu karavanojn al Brazilja.

Plezure ni rimarkas, ke niaj kunlaborantoj ek de nun agadas skribante artikolojn por naciaj gazetoj, propagandas en kluboj kaj eĉ en preĝejoj pri la okazonta UK. Bonega laboro! Kuraĝe! Antaŭen!

- x - x - x - x - x - x - x -

II-A LATINAMERIKA KONGRESO EN ARGENTINO

Kiel ni jam informis niajn geamikojn la II-a Latinamerika Kongreso de Esperanto realiĝos en la urbo São Luis, Argentino, en la 12-a de julio de la venonta jaro 1980-a.

En la pasinta jaro la I-an Latinamerikan Kongreson de Esperanto partoprenis amaso da argentinanoj kaj tiel grandigis la eventon. En la venonta kongreso certe la brazilanoj reciprokos la afablecon aperante amase en São Luis.

Se ni ĉiuj kunlaboros la sukceso estos grandioza.

LA 14-A SEMINARIO DE ESPERANTO

En la urbo Uberaba (MG), de la 19-a ĝis la 22-a de julio venonta okazos la 14-a Seminario de Esperanto, organizata de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Sam-ino Elma do Nascimento, FD de UEA, pri publikaj rilatoj, kaj sekretariino de KKE, informis nin, ke en la sidejo de la Kooperativo ŝi organizis korespondankurson, kiu konsistas el 10 lecionoj. Tiu kurso plaĉas al multaj personoj kaj jam granda nombro da interesatoj enskribiĝis. Kiu interesiĝos lerni per tiu sistemo, volu sin turni al KKE - Rio de Janeiro - Poŝtkesto 1887 - CEP 20.000.

Si samtempe informas, ke baldaŭ aperos ŝia libro - "Trovas, Trovinhas e Trovões" en la portugala lingvo. La libro enhavas ankaŭ rakontojn pri nia popolo.

Siatempe ni anoncos ĝian aperon kaj gratulas nian sam-inon pro ŝia laboro.

BEJO INFORMAS

Dum la 14-a Seminario de Esperanto,

un Uberaba, okazos balotado por elekti novan estraron al Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO).

Ĝia estraro konsistas el:

Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario, 2-a Sekretario, Kasisto kaj 2-a Kasisto. Eventualaj kandidatoj povas enskribiĝi 24 horojn antaŭ la balotado, laŭ la informo de la prezidanto de la organizaĵo, s-ano Ciro Gomes de Freitas.

- x - x - x - x - x - x - x -

TRA BRAZILIO . . .

SETE LAGOAS (MG) - D-ro Wilson Veado, nia vicprezidanto, sendis al ni du librojn nacilingvaj sub la titoloj "Discursos Acadêmicos" kaj "Ética Profissional - Uma Urgente Necessidade" - bela laboro, kiun verkis. Ambaŭ estas legindaj pro la pureco de la lingvo kaj stilo. Krom verkisto, s-ano Wison estas bona desegnisto, utiligante la procedon "bico-de-pena" - plumbeko, laŭ malsupra portreto de "Aleijadinho". Li havas aliajn librojn ankoraŭ ne eldonitajn. Gratulon kaj dankon al nia amiko.



Bico-de-pena de WILSON VEADO sobre tema de Aleijadinho

SALVADOR (BA) — Nia s-ano Sergio Luiz Silva Santos sendis al ni sciigojn pri la agado de la Bahia Esperanto-Asocio, informante, ke la kunlaborado de la anaro estas konstanta, ke la kursoj bone marŝas kaj ke nia karega Vivaldina Caymmi festis sian naskiĝtagon la 24-an de majo. Ni kore gratulas al nia Vivi kaj deziras al ŝi longan vivon.

- x - x - x - x - x - x - x -

ILHEUS (BA) — Nia senlaca s-ano Eleus L. de Sá faris krom bonegaj organizaĵoj, instruado, kunlaborado kun gazetoj, bonegan progreson, ĉar li sukcesis esperantigi sian filon, kiu nun organizis filatelan servon. Lia ĉarma filino ankaŭ parolas Esperanton. Li asertas, ke nun la tuta familio esperantigis.

Prof-ro Sá jam gajnis premiojn pro sia sindona poresperanta laboro. En la kontoro, kie li laboras, la kolegoj estis esperantistaj de li. Ni varme gratulas lin pro lia altvalora klopodo.

Nia vicprezidanto ankaŭ estas reprezentanto de la revuo "Trans Oceana de la P.A.P.I.E.", el Aŭstralio. La interesatoj volu sin direkti al li.

- x - x - x - x - x - x - x -

RIO DE JANEIRO (RJ) — Prof-rino Hercília Valverde malgraŭ sia malforta sanŝtato daŭre batalas por nia movado.

Nuntempe ŝi konatiĝis kun la "Igreja Messiânica Mundial do Brasil, al kiu ŝi apartenas, intencante enkonduki Esperanton.

Ni deziras sukceson kaj baldaŭn resaniĝon al nia karega amikino kaj vicprezidanto de BKE.

- x - x - x - x - x - x - x -

CAÇAPAVA (SP) — Unu el niaj plej bonaj kunlaborantoj estas sendube nia karega s-ano Majoro Gilberto A. Silva Velho.

Li informas nin, ke la Universitato en Campinas (SP) — Unicamp — havas esperantan organizaĵon en sia kadro fondita de prof-ro Ivanhoé R. Baracho. Ke en la urbo Jundiá (SP) la urbestro permesis kurson de Esperanto en la Komunuma Biblioteko. Li ankaŭ informis, ke en la

ŝtato Acre, urbo Rio Branco, ĝia ĉefurbo, la prof-ro Mauro Luiz Aldrigue gvidas Esperanto-kurson.

Ke en la urbo Garanhuns (PE) prof-rino Maria do Socorro Monteiro instruas al 35 gelnantoj la internacian lingvon.

Tiuj sciigoj sincere ĝojigas nin, ĉar ĝis nun neniu sciis, ke en fora ŝtato kiel Acre iu ajn laboras pro nia movado, sed nia diligenta vicprezidanto eltrovis ĝin kaj jam sendis abundan materialon tien.

Gratulan al s-ano Silva Velho. Li estas forta kolono de nia movado. Imtinda estas lia laboro.

- x - x - x - x - x - x - x -

SÃO PAULO (SP) — La 27-an de majo pasinta okazis regiona renkontiĝo de la aktivaj esperantistoj de San-Paŭlo, kiun partoprenis proksimume 20 personoj.

Oni pritraktis la instrumanieron, taŭgan propagandon kaj propagandilojn por nia movado.

Estis decidite, ke en la proksima monato aŭgusto okazos nova renkontiĝo en Rio Claro (SP), organizota de s-ano Ademar Nascimento Alves.

La regionan renkontiĝon ĉeestis la prezidanto de Brazilia Konsilantaro F. S. Almada kaj s-ano Sylla Chaves, prezidanto de Brazilia Esperanto-Ligo.

PORTO ALEGRE (RS) — Elstarigis nuntempe en nia movado sam-ino Nydia Aydos Krieger, el Porto Alegre, por ŝia sindona laboro. Ŝi instruas la internacian lingvon al granda grupo de gesamideanoj, rekrutante novajn elementojn por nia rondo. Ŝiaj gelnantoj ricevas nian Bultenon senpage, kaj ĉar ili bonege komprenas, ke se io estas senpage, iu ajn devas tion fari, sekve ili kolektis monon inter si kaj sendis al ni por helpi la eldonadon de nia Bulteno. Ni kore dankas la helpon kaj deziras plenan sukceson al la kompreneblaj kaj helpemaj novaj gesamideanoj el Porto Alegre. Ke Dio benu ilin!

MACEIÓ (AL)

Sam-no Francisco Alves Mata daŭre aktivas en ĉi tiu urbo. Li senlace klopodas enkonduki la internacian lingvon en diversajn mediojn. Li mem instruas ĝin, organizas renkontiĝojn. Dank'al lia aŭdaca labo-

ro la movado vigligas en Maceió.

JOÃO PESSOA (PB)

Eltranĉaĵoj el gazetoj "O Norte" kaj "União", el João Pessoa, aperigas artikolojn pri la vekiganta movado en tiu urbo.

Laŭ la informoj komenciĝas kursoj de la internacia lingvo, kio de kelka tempo ne ekzistas en João Pessoa, pro la estingiĝo de organizita societo; sed nun ekaktivuloj laboradas entuziasme, kio nin ĝojigas.

La nova estraro de la organizaĵo: Prezidanto - Prof-ro Renato Lemos Diniz; Vicprezidanto - Prof-ro Vanildo Ribeiro de Brito Lira; Sekretario - Aluisio Bonavides Barros; Kasisto - Ricardo Vilela de Oliveira; Bibliotekisto - Salomá Aurelio Sarmento; Kurs-kunordiganto - Prof-ro Manoel Nery; kaj direktorino por Socia Departemento - Prof-rino Neusy Louzada Diniz.

La malnova societo nomiĝis Tabajara Esperanto-Klubo.

Ni deziras sukceson al restarigintoj de la movado en Paraíba.

- x - x - x - x - x - x - x -

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la jenajn, kion ni dankas:

Diário de Taubaté, Correio Fraternal do ABC, Nosso Jornal, Integração, A Can-deia, O NO.SSO, Espírita Fluminense, Univalde, ZET de Jugoslavia kaj Gazeta da Bahia.

ADONIS SALIBA SILVA

Nia juna vicprezidanto Adonis S. Silva forveturis al Svedio, kie li perfektigos siajn studojn pri inĝenierarto. Li sendis al ni bildkarton informante, ke li jam faris plurajn prelegojn en Esperanto pri Brazilo kaj pri nia movado.

Li ankaŭ faros prelegojn en Pollando, pri kiu li informos nin poste. Ni deziras sukceson al nia kara samlandano.

KAMPANJO POR AĈETI SIDEJON AL BKE EN BRAZILJA

Nia financa direktoro s-ano Carlos Augusto Siqueira da Cunha informas nin

pri la situacio de nia kampanjo ĝis la 15-a de junio 1979:

Sumo jam enkasigita Cr\$ 111.000,00 - ricevita de la jenaj kontribuintoj:

01 - Carlos A. S. Cunha	Cr\$ 10.000,00
02 - Francisco de S. Almada	10.000,00
03 - Nelson Pereira de Souza	1.500,00
04 - Allan Kardek A. Costa	4.000,00
05 - José Cecilio de Carvalho	3.000,00
06 - Modesto B. de Abreu	10.000,00
07 - Nelson Ribeiro	5.000,00
08 - Francisca Martos	1.000,00
09 - Nydia Aydos Krieger	10.000,00
10 - Yvone Aydos Krieger	10.000,00
11 - Claudio Zimmermann	1.500,00
12 - Francisco R. de Moraes Sobrinho	1.500,00
13 - Elias Couto de Almeida	1.000,00
14 - Álvaro Rabelo	3.000,00
15 - Antonio R. da Silva	10.000,00
16 - Elvira Fontes	2.000,00
17 - Eugenio José Gramignia	2.000,00
18 - Delio Pereira de Souza	2.000,00
19 - Pedro F. Machado Marques	500,00
20 - Oswaldo Arruda Stein	10.000,00
21 - Enivaldo Alves Silva	500,00
22 - Hélio Fontoura Aderne	500,00
23 - Gumerindo Dias Nunes	10.000,00
24 - Marcelo Vieira de Andrade	1.000,00
25 - Antonio B. de Oliveira	1.000,00

Sumo 111.000,00

Kelkaj pagas je kotizoj monataj. Kiuj volas nin helpi, tiuj povas kolekti grupon, pagante sammaniere, t.e., je kotizoj, kion ni kore dankas.

La aĉeto de la sidejo multe helpas nin ĉe la aŭtoritatuloj, ĉar tiel oni vidos, ke Esperanto ekzistas kaj ke nia movado kreskas en Brazilo. En tiu sidejo ni organizos kursojn poste kaj ĝi estos la kultura centro de la internacia lingvo. Ni povos en la estonteco akcepti vizitontojn, kiuj envenos Brazilion.

PREĜO DE LA BRAZILA PREZIDANTO

Esperatigita de nia vicprezidanto D-ro M. Belmonte de Abreu, jen la preĝo farita de nia Prezidanto João Baptista de Figueiredo, okaze de la meso en la Brazilja Katedralo, la 31-an de majo 1979:
"Sinhoro!

Faru, ke mi estu en ĉi tiu momento

la plej humila el la brazilanoj, por ke mi povu ilin konduki al bona estonteco. Faru, ke ili ĉiuj estu por mi kiel fratoj.

Faru, ke ili estu fratoj unuj de la aliaj, kiaj ajn specaj estu ilia sango, koloro, raso kaj penso; ne gravas al mi ĉu ili kredas en mia Dio aŭ en aliaj.

Faru, Sinjoro, ke mi sciu ilin aŭskulti pri iliaj kritikoj, ankaŭ ke mi havu kuraĝon agnoski mian eraron antaŭ la vero.

Faru, ke en mia malriĉeco mi ekkonu tiujn de miaj civitanoj kaj ke mi sciu klopodi por ke ili vivu pli bone ol mi vivas.

Faru, Sinjoro, ke la homoj min ĉirkaŭantaj, el inter kiuj mi elektis tiujn por mia konsilo kaj por miaj mankoj, ke ili estu, kiel la blovo de via volo.

Faru, ke ili estu por mi fratecaj kaj diskutemaj kaj kuraĝaj por kontraŭdiri miajn mankojn: ke ili estu bravaj por lukti profite de miaj korektaĵoj.

Faru, ke mi kaj ili estu respektemaj en la opinioj de la kreituloj, ke mi kaj ili estu justaj dum ni interparolas kaj interaŭskultas. Faru, ke el ilia saĝeco eknasku la mia.

Faru, ke en la ekzemplo de mia patro, mi laboru por la instruado de nekleraj homoj kaj ankaŭ por ilia libereco.

Faru, ke mi garantiu al ili rajton je pano, grundo, voĉo kaj justeco, por ke mi estu bona brazilano antaŭ la okuloj kaj la juĝoj de ĉiuj miaj fratoj kaj ankaŭ kiel ilia frato mi povu esti memorigita. Tiel estu".

Ni dankas la valoran kunlaboraĵon de D-ro Belmonte.

MONO RICEVITA

Kiel helpoj al nia Informa Bulteno ni ricevis de la jenaj:

Eleus de Sá	Cr\$ 100,00
Prof-ro Aderaldo Rocha	100,00
Kol. Francisco Alves Mata	100,00
Giomar Amélia de Aquino	50,00
Francisca Martos	200,00
Elma do Nascimento	200,00
Livros vendidos	400,00
Claudio Zimmermann	100,00
Luiz Antonio Loyola	100,00
Otto Vaske	100,00
Nydia Aydos Krieger (divs)	400,00
Sumo	1.850,00

Ricevite en Brazilja	Cr\$
Francisco R. Moraes Sobrinho	200,00
João de Oliveira Gama	300,00
Edgar B. Peleja	400,00
Armindo Trarbach	200,00
Sumo	1.100,00

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. (Argentino)

"JE" — Prepozicio komuna, kies senco ne estas difinita kaj kiun oni ĉiam povas uzi, kiam la senco ne montras klara, kia prepozicio konvenas. Oni tamen devas uzi ĝin kiel eble plej malofte kaj en sekvantaj okazoj: Antaŭ cirkonstanca komplemento (horo), je la mateno; je la lasta fojo; de mezuro: la kanalo havas longon je 10 kilometroj; ĉi retiriĝis je kelke da paŝoj; je kiu prezo vi havas ĉambron; mi aĉetas je kredito; 2) Antaŭ la komplemento de adjektivo: mia vivo estas plena je zorgoj; ĉiuj estas kontentaj je si mem; mi ne estas inda je tiu honoro; mia domo estas proksima je la arbaro; 3) Antaŭ la nereкта komplemento: li mortis je iu ne konata malsano; 4) Antaŭ objekta komplemento: havi rajton je io; dum atendo je la pramo.

"La soldato kun lia sulkokovrita frunto aspektis tre maljuna" — Ĉi tie la vorto "lia" ne estas ĝusta. Korekte: "sia". La vortoj "inda" kaj "digna" ne estas egalaj: "Inda" - meritanta ion (ekz. inda je kredo, je laŭdo, je premio). "Digna" - meritanta respekton; "respektinde kondutanta". "Katoj estas bestoj" kaj "bestoj estas katoj" - Ĉi tiu du frazoj estas tute egalaj, ĉar en Esperanto la ordo de la frazpartoj estas libera. La problemon (kiu vorto estas la subjekto, ĉu "katoj" aŭ "bestoj"?) oni povas solvi per la aldono de la vorteto "la": "La katoj estas bestoj". "La oficiro longe rigardis la kvietigitan maron". La vorto "kvietigita" estas malbona. Verbo farita per la sufikso "igi" neniam povas esti en formo de pasiva partecipo, sed nur en la formo de aktiva partecipo. Tial: "... la kvietigantan maron". "La ponto kuŝas trans la kanalon". Malbona frazo. Korektaj frazoj: "La ponto kuŝas super la kanalo". "La ponto kondukas trans la kanalon", t.e., "trans la kanalon" - ĉe la alia flanko de la kanalo. Trans

la kanalon = al la alia flanko de la kanalo. La kompleta formo de la esprimo estas: "en la 1977-a jaro", sed la ĉiutaga uzado kreis la jenajn pli malongajn formojn: "en la jaro 1977", kaj "en 1977". Ĉiuj tri formoj estas egale bonaj.

SPIRITA ELDONA SOCIETO F.V. LORENZ

Ni ricevis ekzempleron de la libro de Huberto Rohden, esperantigita de nia vicprezidanto Prof-ro Delio Pereira de Souza, titolita "EINSTEIN - la enigmo de la matematiko", kiun ni legis kun plezuro kaj rekomendas. Bona libro de la genia Einstein, bele tradukita en klaran lingvon. Ĝi mencias, ke Einstein ŝatis muziki dum li pensadis. Ekzistas anekdoto pri tio. Oni diras, ke li kiam pensadis volonte muzikis kun sia amiko, ĉar liaj pensoj estis for, li ĉiam perdis la takton. Foje lia amiko nervoze diris: "Ne eblas muziki kune kun vi. Vi ja ne kapablas kalkuli ĝis kvar".

La libro estas mendebla ĉe Eldonejo "Societo F. V. Lorenz" - Rio de Janeiro 20.000 - Caixa Postal 3133.

ESPERANTO ELEMENTAR DE F.S. ALMADA

Temas pri taŭga lernolibro por komencantoj. La produkto de ĝia disvendado estas utiligata kiel helpo al nia Informa Bulteno, kiu estas disdonata senpage. Laŭmendo farita de UEA, la libroservo de tiu ĉi organizaĵo ankaŭ disvendis tiun libron. Oni povas mendi al nia redakto laŭ la jena adreso: - Rua Galeão Carvalhal, 31 apto. 73 - 11.100 - Santos (SP) - Brazilo.

ALIAJ LIBROJ REKOMENDINDAJ

"Fraternidade sob a Luz de uma Estrela" kaj "Panorama do Movimento Esperantista Mundial" de Yolanda de Araújo Costa, vendataj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj - Caixa Postal N^o 1887 20.000 - Rio de Janeiro (RJ). Ni ne forgesu, ke bonaj libroj estas aĝablaj donacoj al geesperantistoj.

INVITO DE LA ĈEFDELEGITO

Al ĉiuj delegitoj, vicprezidantoj kaj fakdelegitoj de UEA en Brazilo la ĉefdelegito s-ro Grattapaglia direktas inviton par-

topreni la 14-an de Seminarion, okazontan en Uberaba (MG), de la 19-a ĝis de 22-a de julio ĉijare.

La kunveno de la delegitaro celas interŝanĝi ideojn. La tagordo estas, inter aliaj, pritrakto de la plej interesaj sugestoj ricevataj; respondo al demando "Dek demandoj al brazilaj delegitoj de UEA"; rolo de la delegita reto de UEA dum preparado de la 66-a Universala Kongreso en Brazilja (DF) en 1981.

INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AŬTOMOBILISTA

Malgraŭ la petrolo krizo, aŭtomobilo restas ankoraŭ alloga celo por milionoj da homoj, kiuj kapablas rezigni pri aliaj plimalpli esencaj konsumoj, sed ne volas rezigni veturadi, eble pro tiu atavisma nomada sento de la homaro.

Pro tiu, ankaŭ en nia movado, la Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) daŭre progresas kaj la lasta statistiko (Varna 1978), nombris 1149 membrojn en 35 landoj.

Plej rimarkinda laboro de la klubo estas la normigo de aŭto-teknika nomenklature en Esperanto, per la baldaŭ eldonita "Teknika Aŭtomobil-Vortaro" en 7 lingvoj ampleksa verko kun pli ol 5.000 terminoj.

Brazilo ankoraŭ ne estas videble reprezentita en la klubo, sed tiuj, kiuj deziras konkrete kontribui al divastigo de Esperanto en aŭtomobilismo, fariĝu dumvivaj membroj de IEKA. La aliĝkotizo estas preskaŭ simbola kaj ĝis la fino de 1979 ĝi sumas je nur 100,00 kruzejoj. Vi ricevos la insignon de la klubo glueblan sur la antaŭ-glacon de via aŭto, akiras la rajton aĉeti la vortaron je favoraj kondiĉoj kaj spertos la solidarecon de esperantistaj aŭtomobilistoj en 35 landoj! La kotizon vi povos sendi per poŝtmandato aŭ per ĉeko enkasigebla en Brazilja al "S-ro Giuseppe Grattapaglia - Caixa Postal 04-0097 70.000 - Brasilia - DF". Estos eble ankaŭ aliĝi dum la Esperanto-Seminarion en Uberaba kiam, dum aparta kunveno, estos prezentitaj la ĉefaj trajtoj de la vortaro. Al ĝia kompilado kunlaboris teknikisto el diversaj landoj kaj por ĝia eldonado, IEKA jam faris kontrakton kun la nederlanda firmo Kluwer.